# Espero Katolika



Numero 7-8/2000

Julio-Aŭgusto 2000

JARKOLEKTO 97 - N. 948-949 - Julio/Aŭgusto 2000
*Finpresita la 28.10.00* — Finito di stampare il 28.10.00

**Sur la kovrilo:** *La Papo kun 5 gejunuloj reprezente de la 5 kontinentoj, en Tor Vergata, dum la junulara monda tago.*

## ENHAVO

ENKONDUKE 119

LA MONDA TAGO DE LA JUNULARO 2000

Kristana kaj sociala **revolucio** 120

LA KRONIKO:

14.8.2000 La gejunuloj **alvenas** 121

15.8.2000 **Inaŭguro:** Romo fariĝis ĉefurbo de la junularo 122

16.8.2000 La jubileaj **rendevuoj** por la junularo 126

17.8.2000 Romo estas subĉiela **Baziliko** 128

18.8.2000 La rito de la **Krucvojo** 130

19.8.2000 Nokta **preĝoviglado** kun la Papo en Tor Vergata 132

20.8.2000 La **fermo** de la JMT 136

kaj post la JMT:

23.8.2000 La Papo **revuas** sian memorindan renkonton kun la gejunuloj 140

**"Survoje al Romo"** unu el la atestoj pri akcepto de gejunuloj 142

**IKUE 90-JARA: AUSTIN RICHARDSON (dua parto)**

Lia rememoro pri la **fondinto** de Espero Katolika 144

**Dulanda IKUE-renkontiĝo en Žilina** 149

**" LA VIRETO KIU SURGRIMPIS ARBON "**

La sinjorinoj, kiuj helpadis Lin (Luk 8,1-3) 151

**Radio Romo**, 147 - **Radio Vatikana**, 150 - **Landaj Reprezentantoj**, 152

**Centra Oficejo de IKUE: Via di Porta Fabbrica 15, I-00165 ROMA RM, Italio**

**Telefono kaj fakso:** +39-06.63.28.39 *(funkcias 24-hore)* — **poŝta konto** 23290000 Roma

**Elektronika poŝto:** <esperokatolika@ikue.org> aŭ <ikue@ikue.org> — **UEA-konto** "ikue-v"

**TTT-paĝoj:** http://www.ikue.org — **Dissendolisto:** <ikue@egroups.com>

*Registriĝo ĉe la tribunalo de Romo* - Registrazione presso il Tribunale di Roma
n. 17138, 11-2-1978

Gratis agli Associati

*Presejo* - Tipografia

ROTASTAMPA s.a.s. - Via G. Mirri 21, 00159 ROMA RM, tel. +39-06.43.80.051

*Respondeca Direktoro* - Direttore responsabile

Antonio DE SALVO, Via Aldebaran 13, Parco Azzurro, I-00010 GUIDONIA RM, Italio
tel. (vespere) +39-07.74.36.36.03 — E-poŝto: <a.desalvo@priminet.com>

**Espero Katolika**, revuo fondita en 1903, estas oficiala organo de **I.K.U.E.**
**INTERNACIA KATOLIKA UNUIĜO ESPERANTISTA** internacia asocio de fideluloj fondita en 1910. Ĝi estis agnoskita laŭ pontifika juro per Dekreto n. 196/92/S-61/B-25 de 11.2.1992 de la PAPA KONSILIO POR LAIKOJ. **Honora Prezidanto:** Sac. Duilio Magnani - **Prezidanto:** Antonio De Salvo - **Unua Vic-Prez.:** Miloslav Šváček **Dua Vic-Prez.:** Sac. Lajos Kóbor **Sekretario-Kasisto:** Carlo Sarandrea - **Estraranoj:** Jan Kalný, Serio Boschin, Sac. Ulrich Hatto v. Hatzfeld, Sac. Duilio Magnani, Magda Šaturová, Barbara Pietrzak.

## Enkonduke

*Karegaj Gefratoj,*

malfacilas rakonti tion, kion ni en Romo vidis dum la tagoj de la junulara monda tago. Ĉie - vere ĉie, en ĉiuj kvartaloj, ankaŭ tiuj plej foraj - la junularo de la JMT alportis sian entuziasmon, sian ĝojon, sian ateston. «Vi venis por lerni, sed estas ni, tiuj, kiuj lernis»: deklaris la urbestro de Romo. Kaj laŭ la ĝenerala direktoro de Radio Vatikana «ĝi estis eksterordinara sperto: granda epifanio de la spirito ("spirito" laŭ ĉiuj ĝiaj signifoj); vera spiritualeco, sed ankaŭ suprenlevo de difinitaj valoroj, de certaj potencivoj de la homa spirito, ekzemple, de la kapablo esperi».

Plurfoje la Papo substrekis, ke la Eklezio ne povas trapasi la sojlon de la tria jarmilo sen adresi sin speciale al la gejunuloj, kiel celatoj de la savo-mesaĝo de la Evangelio, sed ankaŭ kiel novaj evangelizantoj, al kiuj estas konfidita la tasko alporti tiun mesaĝon al la tuta nunepoka socio, per renovigita apostola zorgo kaj per freŝa lingvaĵo.

Ni scias, ke la Papo multe konfidas je la gejunuloj. «Vi estas la espero de la Eklezio, mia espero!», li deklaris komence de sia papado. Kaj ankaŭ tiuj du junuloj - kiuj sukcesis "moki" la sekurec-sistemon de polico kaj de sekretaj servoj (ni vidis tion mondovizie) - kaj povis ĉirkaŭbraki la Papon kaj paroli kun li, koro al koro, estas unu el la multaj signoj pri la speciala sintonio, pri la vera amsento kiu staris inter la Papo kaj la gejunuloj de la tuta mondo - amsento kiu pli kaj pli fortiĝis dum ĉiuj JMT, ekde la memorinda renkonto en Romo en 1984.



Al ĉiuj gejunuloj la Papo, posteulo de Petro (la unua kiu konfesis sian kredon je Kristo Filo de Dio) donis la precizan taskon konfesi, anonci kaj travivi la kredon de la Eklezio dum sia juna vivo, por ŝanĝi ne nur sian vivon laŭ la Evangelio, sed ankaŭ por renovigi la historion, per la forto de amo kiu fontas el la kruco de Kristo kaj igi tiel la mondon pli libera, paca kaj solidareca.

EK provas rakonti la tagojn de la JMT en Romo. Ni aranĝis la kronikon kiel ĉiutaga eldono de ĵurnalo. Sed ni opinias, ke pli ol la skribita teksto, parolos al vi la fotografioj (ĉi-numere pli abundaj ol kutime).

Vi rimarkos, ke ĉi tiu numero de EK estas preskaŭ unutema: ni opiniis, ke la evento, tiom impona kaj memorinda, meritis la atenton kiun ni dediĉis.

*Bonan legadon!*

**Carlo Sarandrea**

# LA MONDA TAGO DE LA JUNULARO: KRISTANA KAJ SOCIALA REVOLUCIO

Ekde la 15a ĝis la 20a de aŭgusto 2000 Romo estis la ĉefurbo de la junularo. Paca invado, kiu impresis la loĝantojn kaj la mondon pro ĝia komposteco kaj entuziasmo, sed ĉefe pro la profunda mesaĝo kiun ĝi donis.

La vibranta sperto de rilato konstruita de la gejunuloj kun la Papo kaj, des pli, ilia kontraŭkonformeco el evangelia gusto, kiu ne ebligis al fakuloj enlistigi ilin en unu el la antaŭpretigitaj kategorioj de la junulara universo, trarompis konsolidiĝintajn soci-ideologiajn strukturojn. Du milionoj da junaj kristanoj diris al la mondo, ke ilin ne kaptas la allogeco de la diversaj "malfortaj pensoj", sed ke ili male preferas la laŭsisteman dubon, la kredon je altegaj valoroj, ĝis sinofero por ili. Kopernika revolucio kiu estigis meditojn kaj konsilis historiajn reviziismojn.

Ke la JMT estus la plej impresodona evento de la Jubileo, oni klare sciis, sed la realo - kiel substrekis ankaŭ la Papo - iris trans ĉiuj atendoj. Ne nur koncerne nombrojn, sed ankaŭ koncerne la spiritan kvaliton: centoj da miloj da gejunuloj atingis Romon por travivi intensan spiritan sperton kaj travivi ĝin sentante sin interne de la granda komunumo de la universala Eklezio. Pro tio ili volonte akceptis, senprobleme, la malkomfortaĵojn de la strato kaj de la varmego, la longajn tagojn sub flamanta suno kaj la improvizitajn kuŝlokojn.

Celkonscia junularo, do, kiu ne timas aŭskulti la ripeton, fare de la Papo, de tiuj vortoj al kiuj li kutimigis nin, kaj kiuj estas la fortaj vortoj de Kristo pri la senpaga memdonaco, pri la pardono, pri la vivopureco, pri la respondo je plej devigaj alvokoj. Ili revenis al siaj hejmoj kaj denove estas en sia ĉiutaga medio, kie ili devas vivi kontraŭflue. Sed nun ili sentas la fortan subtenon de la Eklezio kun kiu ili renkontiĝis; ili daŭre aŭskultos la reeĥon de la amemaj kaj kuraĝigaj vortoj de maljuna paŝtisto, maljuna sed proksima al ili laŭ simpla maniero, kiu balancigas sin kaj batas la manojn kantante kaj ridante kiel ili. Paŝtisto kiu mencias polan proverbon ("kiu restas kun la gejunuloj, rejuniĝas"), pensante pli al si mem ol la Eklezio de la tria jarmilo. Jes, efektive la JMT anoncis grandan esperon por la estonteco: la Eklezio estas juna, la misio sekvi kaj anonci Kriston, 2000 jarojn poste, ne maljuniĝis; nun ĝi estas transdonata en bonajn manojn.

Ni revuu mallonge la enhavon de tiuj eksterordinaraj tagoj en Romo. Ni aranĝis la kronikon potage, kvazaŭ kolekto de tagaj eldonoj de ĵurnalo, por komprenigi interalie la kreskadon, tagon post tago, de la ĝojo, de la nombroj, sed ĉefe de la profunda spirita riĉeco, kiu karakterizis la JMT'on.

## 14.08.2000

Post etapoj en gravaj jubileaj lokoj, la ondo da junaj pilgrimuloj fluas al Romo.

# *ALVENAS LA UNUAJ DEKOJ DA MILOJ DA GEJUNULOJ POR LA JMT*

*dum laboras la Internacia Forumo de la Junularo.*



**Minus unu**, kaj la meznombra aĝo de Romo komencas malaltiĝi. Antaŭtage de la plej svarma jubilea evento - la monda tago de la junularo - la itala ĉefurbo malfermas la pordojn de la lernejoj, de la kazernoj, de la tendaroj, de siaj ordinaraj kaj eksterordinaraj gastigejoj por ricevi la unuan, amasan grupon da gejunuloj. La informagentejoj pene sukcesas atenti la kalkulon de la alvenantaj fluoj. La italaj fervojoj anoncis, ke ili alprenis eksterordinarajn rimedojn por faciligi la vojaĝon de la 110.000 gejunuloj kiuj alvenos al Romo per la trajnoj. 272 lernejoj de la komunumo portempe fariĝos multrasaj dormejoj. Cetere, la diversaj vizaĝtrajtoj kaj la svingado de naciaj flagoj kiuj akompanas la diversajn grupojn komencis de kelka tempo marki la komunik-vojojn de la itala duoninsulo. Ili alvenas, multaj post etapo en Asizo, kie la Baziliko de Sankta Francisko kaj la ĉirkaŭaj lokoj vidis moviĝi aŭ ripozi milojn da eŭropaj, sudamerikaj, aŭstraliaj, aziaj gejunuloj, en la atendo komenci trairi la lastan vojopecon al Romo.

Ekde la 12a de aŭgusto en Romo 400 iliaj reprezentantoj, delegitoj de ekleziaj movadoj kaj episkoparaj konferencoj, kunsidas por la internacia Forumo de la Junularo: tagoj de meditoj kaj preĝado por la reprezentantoj de 128 landoj de la mondo. Pluraj estas la temoj de la Forumo: la graveco de ĝojo ankaŭ dum suferado por la kristana vivo; transdoni la Evangelion en la nova jarmilo ktp. La gejunuloj kunvenas ĉiutage por meti je ĉies dispono siajn ideojn kaj spertojn.



La finan dokumenton de la Forumo oni transdonos al la Papo dum la ferma JMT-ceremonio.



## 15.08.2000

Tiel parolis la Papo ĉi-matene antaŭ la Anĝeluso. Hodiaŭ posttagmeze okazis la inaŭgura ceremonio.

# *"ROMO EKDE HODIAŬ ESTAS LA MONDA ĈEFURBO DE LA JUNULARO"*

*La granda tago alvenis.*
*16 jarojn poste, Romo remalfermas siajn brakojn al la junaj pilgrimuloj.*



**Ekde hieraŭ** rivero da geknaboj, kun dormo-sakoj, akvo-boteloj, gitaroj, kaj ĉefe kun multe da ĝojo inundas la italan ĉefurbon.

Ili hodiaŭ estas preskaŭ 500.000, avangardo de la pli ol unu miliono kaj ducent mil antaŭvidita por la tagoj 19a kaj 20a en Tor Vergata, kie okazos la kulmina renkontiĝo kun la Papo.

Miloj alvenis hieraŭ en la flug-haveno kaj centra stacidomo. Ili alvenas el 160 landoj. Oni sendis ilin al la 300 paroĥaj sekretariejoj. Tridek mil el ili loĝas ĉe familioj, la aliaj ĉe 350 paroĥoj, 300 organizaĵoj, 32 seminariejoj, 1052 lernejoj. Poste estas la "blua maro" de la 25.000 volontuloj, kiuj, kun sia blua devizo kaj la tornistro de la pilgrimulo, subtenas la realigon de la evento. Oni vidas ilin ĉie ĉar estas ili kiuj helpas, purigas, kontrolas.

Jen la rakonto de ĵus alveninta juna pilgrimulo: «La vojaĝo estis bona: la Sinjoro tre helpis nin. Nun ni estas lacaj, sed ni same estas tre feliĉaj: *ĉio, kio okazas, estas donaco de Dio*. Oni akceptis nin kiel amikoj, kvankam ili neniam vidis nin antaŭe. Ĝi estas granda ĝojo, ĉio tio, granda, forta kredo-sperto».

Hodiaŭ finiĝis la internacia Forumo: la gejunuloj pretigis dokumenton, kiun oni legos al la Papo la venontan 19an de aŭgusto, dum la nokta viglado en Tor Vergata.

La monda tago komenciĝis hodiaŭ posttagmeze: longa ĉirkaŭbrako inter



*Trairinte la urbon meze de seninterrompa viciĝo de gejunuloj, la Papo atingas Placon Sanktan Petron, por daŭrigi la inaŭguron de la JMT, post la unua parto ĉe la Baziliko de Sankta Johano laterana*

celebri: la Parolo kiu fariĝis karno kaj venis loĝi inter ni».

Per ĉi tiuj vortoj la Papo akceptis la romajn kaj italajn geknabojn kiuj estis en Placo Sankta Johano Laterana, invitante ilin malfermi siajn korojn al Kristo, ripetante la inviton kiun li faris komence de sia papado: «Ne timu! Malfermu, eĉ malfermegu la pordojn al Kristo! Malfermu viajn korojn, viajn vivojn, viajn dubojn, viajn malfacilaĵojn, viajn suferojn kaj viajn ĝojojn kaj amemojn: malfermu ĉion tion al lia savodona forto kaj lasu, ke li eniru en viajn korojn!».

la Papo kaj la gejunuloj ekde Placo Sankta Johano Laterana ĝis Placo Sankta Petro. La Papon akceptis la nerezistebla entuziasmo de la preskaŭ 700.000 geknaboj el 160 landoj, kiuj svarmis en la du romaj placoj. «Ho Romo vi estas feliĉa, ĉar Vi estas konsekrita de la atesto kaj de la sango de la apostoloj Petro kaj Paŭlo, kiuj ankoraŭ hodiaŭ kiel lumantaj lampoj indikas al ni Tiun, kiun ni ĉi tie volas

***Placo Sankta Petro kaj la fronta aleo svarmis je gejunuloj***





Poste, kuntrenita de la entuziasmo de la gejunuloj, kiuj kriadis: «Vivu la Papo!», li komencis ŝerci kun ili: «Jen: vivu! Li vivas jam de 80 jaroj, kaj la gejunuloj volas lin ĉiam juna: kion fari?».

Johano Paŭlo la 2a poste atingis per aŭtomobilo Placon Sanktan Petron, kie la gejunuloj plenigis la tutan frontan aleon *("Via della Conciliazione")*; kelkaj el ili grimpis sur la kolonojn kaj sur la kradojn de la fenestroj de la apudaj palacoj. Dum la veturado, la himnoj de la diversaj mondaj junularaj tagoj memorigis la diversajn internaciajn renkontiĝojn: Romo, Buenos Aires, Santiago de Kompostelo, Ĉenstoĥovo, Denver, Manilo kaj Parizo.

Ankaŭ ĉe Vatikano (kie estis la neitalaj junaj pilgrimuloj) la juna Eklezio akceptis la Papon per grandega entuziasmo kaj aplaŭdoj. Sur la vizaĝo kaj en la vortoj de Johano Paŭlo la 2a oni konstatis grandan ĝojon kaj kortuŝon.

Kaj antaŭ ol oficiale startigi la solenojn de la monda tago, la Papo volis adresi penson al la gejunuloj kaj Paŝtistoj de aliaj Eklezioj kaj ekleziaj komunumoj: «Estu la monda tago - li diris - okazo por reciproka kono kaj de kuna preĝado al la Sankta Spirito, por peti la donacon de la plena unueco».

La Papo salutis ĉiujn reprezentatajn landojn, menciante ilin unu post la alia. Sekve oni legis la komencon de la Evangelio laŭ Johano, temo de la JMT. En sia parolado la Papo memorigis ke nuntempa filozofo difinis la homon estulo por la morto. «La Evangelio male - li diris - reliefigas ke la homo estas estulo por la vivo. La homo estas estulo vokata partopreni en la dia vivo». Poste la Papo memorigis la jarojn de sia infaneco kaj juneco, rakontante sian personan sperton kaj ripetante sian kredokonfeson: «Jes, mi kredas; mi igas miaj la vortojn de apostolo Paŭlo: *ĉi tiun vivon en la*



aŭ maldolĉaj de la vivo - Li ne ĉesas peti al ni kredi je Li, je Lia Parolo, je la realaĵo de la Eklezio, je la eterna vivo!».

***"KION VI VENIS TROVI? AŬ PLI BONE: KIUN VI VENIS TROVI?"***

*karno, mi travivas en la kredo je la Filo de Dio kiu min amis kaj fordonis sin mem por mi.* Mia kredo daŭras dum mia nuna servado al la Eklezio. Kiam la 16an de oktobro 1978, post elekto al la Sidejo de Petro, oni demandis al mi: 'Ĉu vi akceptas?', mi respondis: 'Obeante en la kredo Kriston mian Sinjoron, konfidante je la Patrino de Kristo kaj de la Eklezio, malgraŭ la grandaj malfacilaĵoj, mi akceptas'».

Persona sperto rakontita por substreki ke la kredo iras tra tio, kion ni travivas: «La Sinjoro donas al mi, kiel Li donas al vi, sian Spiriton, por ke ni diru: *'Mi kredas'*, uzante nin poste por atesti Lin en ĉiu angulo de la tero... Kredu do tre multe je Li: Li kondukas la historion de la unuopuloj, samkiel tiun de la homaro. Certe, Kristo respektas nian liberecon, sed en ĉiuj okazintaĵoj - ĝojaj

Ĉi tiu demando de la Papo adresita al la gejunuloj estigis unuaniman respondon. Al ĝi respondis unu el la partoprenantoj: «La ĉeeston de Dio en ni mem kaj en la proksimuloj. Sukcesi trovi Kriston: jen la celo de nia vivo de kristanoj. Diri: 'Malfermegu la pordojn al Kristo' ne estas ĉiutagaĵo. Tamen, fine, kiam oni staras meze de ĉiuj ĉi eventoj, nu, ĉio fariĝas ebla. Oni komprenas, ke ĝi fariĝas ebla. *Ĉio eblas en la nomo de Kristo:* ni devas scii tion, ĉar Li estas la unika Persono je kiu ni povas konfidi. Temas pri granda respondeco kiun la Papo donas al la gejunuloj».

Post la fina beno, inter kantoj, aplaŭdoj kaj ĝenerala entuziasmo, finiĝis la malferma ceremonio en Romo, vere "ĉefurbo de la junularo de la mondo", kiel la Papo difinis ĝin antaŭ la Anĝeluso.

## 16.08.2000

# *Paŝtistaj instruoj, pilgrimo al la tombo de Petro, konfesprenoj ĉe la Cirko Granda, la internacia Meso*

Kvar rendevuoj por la geknaboj de JMT, laŭgrupe ĝis vendredon

Post la emociplena malfermo de la 15a monda tago de la junularo, hodiaŭ la vatikana Baziliko estas ankoraŭ plena je geknaboj, kiuj, laŭvice, faras sian jubilean pilgrimon al la tombo de Petro. Laŭlonge de la itinero reeĥas la aŭd-animado per meditoj pri la beatecoj kaj la kredo de Petro. Antaŭ aŭ post la vizito en la Baziliko, la geknaboj partoprenas en la internacia Meso kaj ricevas la sakramenton de la Repaciĝo ĉe la Cirko Granda, kie je ilia dispono estas 2.000 pastroj, ekde la 7a matene ĝis noktomezo.

Temas pri la plej spirita dimensio de la JMT. Romo dividiĝis "geografie" laŭ samtempe tre detala kaj giganta organizado, por ebligi, ekde la horo 6.30 de hodiaŭ matene, laŭvican plenumon de la unuopaj rendevuoj, dum la tri tagoj.

Laŭ la hodiaŭa komuniko de la gazetara salono de la Sankta Seĝo, la Papo esprimis «sian plenan ĝojon por la etoso de festo kaj pro la entuziasmo» per kiu la pli ol 700.000





***Dum horoj, seninterrompa enviciĝo da pilgrimantoj iras al la Sankta Pordo***

pilgrimuloj komencis sian Jubileon, akceptante «per la freŝeco kaj spontaneco de la junaĝo, lian inviton pligrandigi la amikecon kun Kristo kaj atesti sian kredon».

Tricent estas la lokoj indikitaj por la ĉiutagaj meditoj, por aŭskulti la voĉon de dekoj da kardinaloj kaj episkopoj en 32 diversaj lingvoj.

Hodiaŭ krome 15 geknaboj el la 5 kontinentoj, reprezentantoj de la internacia Forumo tagmanĝis kun la Papo en Kastelgandolfo. Unu el ili, 19-jarulo el Italio, siamaniere rakontas: «La Papo manĝis bonege. Menuo estis sufiĉe simpla: ŝinko kaj melono, nudeloj kun tomato, viando kun terpomoj kaj kukurbetoj kaj fine dolĉaĵo. Temis pri grandega impreso. Oni estis tre streĉitaj. Dum oni manĝas, oni timas erari, konfuzi la forketojn, faligi ion kaj ĉefe malbone impresi. Post kelkaj minutoj tamen ĉio pasas kaj estas kvazaŭ resti inter geamikoj. Kaj ni eĉ kantis fronte al la Papo, kaj ni daŭrigis ĝis "Romagna Mia" *(Mia Romanjo, foklora kanto de la regiono de Rimini ndlr),* kiun la Papo tre ŝatas. Vere tagmanĝi kun la Papo estas neimagebla afero. Ĝi estas kvazaŭ venki loterion: la plej bela momento estis kiam mi manpremis kaj ĉirkaŭbrakis lin».





***Momentoj de pentofaro en la Cirko Granda, kie por la gejunuloj restas je dispono 2.000 pastroj, ekde la 7a matene ĝis noktomezo.***

## 17.08.2000

# *ROMO FARIĜIS SUBĈIELA BAZILIKO. 900.000 LA ĜIS NUN ALVENINTAJ GEKNABOJ*

*Estas impresiga la nombro sed ĉefe la spirito de enmemiĝo kaj de preĝado de la gejunuloj, kiuj, miloj kaj miloj, ankaŭ hodiaŭ trapasas la Sanktan Pordon de la vatikana Baziliko.*
*La Papo en Kastelgandolfo akceptas la gejunulojn de la Forumo*

**Pli ol 280** kulturaj kaj ripozigaj lokoj tra la urbo: temas pri la tiel nomataj "Incontragiovani" (Renkontiĝo-Junuloj) , kun densa programo da spektakloj, koncertoj, artaj vesperoj, inkluzive de internacia renkontiĝo pri la martiroj de la 20a jarcento. Inter la famaj artistoj: Miriam Makeba, José Carreras, Hong Mei, Chicago Gospel Choir.

«La Eklezio bezonas vin, vian sindevigon, vian malavarecon». «Portu kun vi la riĉecon de la homa, spirita kaj eklezia sperto de la Forumo... La vortoj de vivo kiujn vi ricevis, agos kaj radikiĝos en vi, des pli vi kundividos ilin kun la aliuloj»: jen la invito kiun Johano Paŭlo la 2a faris hodiaŭ al la 400 gejunuloj el 128 landoj kiuj partoprenis en la internacia Forumo de la JMT kaj kiuj fine redaktis dokumenton kiun oni prezentos al la Papo venontsabate, dum la granda nokta viglado ferme de la Monda Tago.



Por ili la Papo celebris Meson en la korto de la Apostola Palaco en Kastelgandolfo. Menciinte la sperton de profeto Jeremio (kiu embarasiĝis ricevante la mision paroli ennome de Dio), la Papo kura-



ĝigis la gejunulojn jene: «Ne timu alpreni viajn respondecojn, la Eklezio bezonas vin... la Papo bezonas vin... kaj li petas al vi alporti la Evangelion laŭ la vojoj de la mondo». Kaj post mencio de la demando de la resurektinta Jesuo al Petro ("ĉu vi amas min?") la Papo finis jene: «Li ne petas al vi kapabli paroli al popolamasoj, kapabli mastrumi organizaĵon, administri havaĵon. Li petas al vi ami Lin: ĉio cetera venos konsekvence. Ne forgesu ke la vera amo ne starigas kondiĉojn, ne kalkulas, ne plendas, sed simple amas».



Hodiaŭ kiel hieraŭ Romo aspektas subĉiela Baziliko. Miloj da gejunuloj trairas la Sanktan Pordon: po 20.000 fideluloj ĉiuhore, kiuj iras aŭskultante la meditojn proponitajn de laŭtparoliloj, pri la beatecoj kaj pri la kredo de Petro.

Ĉi-vespere ĉe Laterano okazis preĝo-viglado kaj koncerto. En stadiono havis lokon la "Gen-festo" de la movado de la "fajrujoj", kun la ĉeesto de ĝia fondintino Chiara Lubich kiu relanĉis la eternan inviton: «Ni daŭre amu, kaj la tuta mondo ŝanĝiĝos. Ni amu kaj ni kontribuos al la starigo de civilizacio de amo».

## 18.08.2000

La tria kaj lasta tago de la konfesprenoj kaj de la pilgrimoj al la Sankta Pordo konkludiĝis per la vespera rito de la Krucvojo, kun 400.000 geknaboj

# *Laŭ la vojo de la kruco por konfidi al Jesuo la suferojn de la mondo*

Ankaŭ en la hodiaŭa lasta tago de konfesprenoj, la Cirko Granda estis plenplena da junaj pentantoj, tiel ke oni difinis la lokon "areno de la pardono". Areo tre antikva kaj inundita de suno en la koro de Romo, ne malproksime de Amfiteatro Koloseo. Laŭ longa enviciĝo la miloj da gejunuloj atendis povi paroli kun unu el la pastroj kaj episkopoj el ĉiuj naciecoj. Scenejo kiu altiris grandan parton de la atento de amaskomunikiloj, ĝenerale mirigitaj de la "sukceso" atingita de praktiko konsiderata ne plu ofta.

Ekde Cirko Granda ĝis *Via della Conciliazione* (la aleo fronte al Vatikano) la JMT proponas en la nunaj tagoj la plej tipan aspekton de la kredanto en Romo dum la Jubileo: la pilgrimo al la tombo de Sankta Petro kaj la transiro de la Sankta Pordo: ankaŭ ĉi-kaze la rigardo vastis sur la seninterrompa viciĝo de miloj da gejunuloj. «Kundividi la sperton trapasi la Sanktan Pordon kaj ĉefe, fari tion kune, signifas senti nin vere kiel Eklezio» deklaris junulino.

Ĉi-vespere okazis la Krucvojo ekde Ara Coeli (kapitola monteto) ĝis amfiteatro Koloseo, kun la partopreno de granda amaso da gejunuloj.



Oni portis la grandan krucon de la JMT, kiu morgaŭ estos en Tor Vergata.

Ĝi estis speciala Krucvojo. Nur la nombro da stacioj, 14, korespondis je la tradicio. Kaj ĉe ĉiu stacio oni legis, diverslingve, evangelian fragmenton kaj mediton, dum la aktualigo de la aŭskultitaj mesaĝoj estis konfidita je la preĝo-atesto de junuloj el la tuta mondo. La spertoj konfrontiĝas kun la suferado de Jesuo: kun junuloj de la "unua mondo" viciĝas reprezentantoj de la "tria mondo". «Mi estas bonŝanca, mi havas ĉion... kaj mi demandas al la Sinjoro, kion fari el mia vivo», diris juna germano. «Kiom kostas la fideleco je la vivanta memoro pri via dispecigita korpo kaj pri via verŝita sango?», demandas al si juna salvadorano, memorigante la morton de mons-ro Oscar Romero, murdita en 1980 en Sansalvadoro, dum li celebris la Eŭkaristion. Parolis ankaŭ

juna indoneziano, kiu konstatas la situacion en sia lando: «Insularo de multaj popoloj, etnaj grupoj, religioj, en kiu, Sinjoro, ni ne kapablas kunvivi».

«Memoru ĉiujn mortkondamnitojn kiuj, en multaj mondopartoj, kundividas kun vi la pezon de ne apelaciebla kondamno»: tion diris juna usonanino ĉe la 6a stacio, kiu memorigas Kriston juĝatan de Pilato.

Preĝis por la paco juna palestinano. Pri la pardono, rŭandia knabo diris: «se oni povas pardoni tiujn, kiuj murdis la filon de Dio, ĉiuj povas esti pardonitaj. Ankaŭ ni pardonas kaj pardonpetas. Instruu al ni venki malbonon per la bono. Ke la pardono kresku en la koroj, ĉefe kie malamo kaj perforto disŝiris la popolojn», kaj li memorigas la tragikajn eventojn de la genocido de 1994, kun pli ol 500.000 viktimoj.

Ĉe la 12a stacio parolis junulino el Gvineo: «Igu ke la junaj adoleskantoj de la tria jarmilo povu malkovri ĉe la kruco de Kristo la





valoron kaj signifon de nia vivo kaj ke ni povu kredkonfesi ke vi vere estas la Filo de Dio».

Fine, ĉe la lasta stacio, kiu memorigas Kriston metitan en la tombon, junulo el Mozambiko memorigas kiam, je tagiĝo, lia vilaĝo estis inundita de akvo. La preĝo estis ke Mozambiko kaj la tuta Afriko povu denove revidi tagiĝon, tiun de la resurekto.

Fajrujoj kaj kandeletoj lumigas la iradon, kiu finiĝas per la mesaĝo de kardinalo Camillo Ruini, vikario de la Papo por Romo: «Igu ĉiun el ni, via atestanto, humila sed kuraĝa, sincera kaj sen hipokriteco. Donu al ni la forton porti la krucon, kune kun Vi, kaj porti ĝin kun ĝojo».

Multaj signifaj atestoj estis donitaj de la gejunuloj: «Se vi volas atingi ion en la vivo, tiam vi devas akcepti ankaŭ suferadon. La Krucvojo restas la momento kiam ni povas pensi je tio». «Krucvojo estas la momento de la humaneco de Jesuo. En ĝi la gejunuloj sentas Jesuon tre proksima».

## 19.08.2000

La festo en Tor Vergata, invadita de preskaŭ unu miliono da gejunuloj, kiuj ĉi-vespere akceptis la Papon por la nokta preĝo-viglado

# *«ESTAS JESUO, TIU, KIUN VI SERĈAS KIAM VI SOPIRAS AL FELIĈO...»*

Triumfo de ĝojo, koloroj, de kortuŝo-dona spiritualeco dum la viglado kun la Papo, kiu tiel invitis la gejunulojn: «En la nova jarcento vi ne konsentos fariĝi rimedoj de perforto kaj de detruado».

**Dum la tuta tago** alvenis - kaj daŭre alvenos, por ĉeesti la morgaŭan fermon - la junaj pilgrimuloj: etoso de ĝojo regis la tutan areon (330 hektaroj) malgraŭ varmego. La 12.000 fontanetoj transformiĝis en duŝoj.

«Mi longe atendis povi vidi vin en ĉi tiu nokto!», konfidis Johano Paŭlo la 2a al la gejunuloj de la neforgesebla viglado en Tor Vergata, kaj ili certe portos en sia koro la sperton unika de ĉi tiu renkonto, samkiel la multaj milionoj da personoj kiuj per televido spektis la eventon.

Ravaj kantoj, kortuŝaj atestoj, triumfo de ĝojo, de koloroj, de emociplena spritualeco; tiuj ĉirkaŭbrakoj de la geknaboj kun la maljuna Papo kiu ne kapablis haltigi la larmojn, sed kiu estis feliĉega vidante en la okuloj de la junularo la esperon de la estonteco. Tiuj levitaj kaj kunplektitaj brakoj, ondumantaj sub steloplena ĉielo kiu rebriligis la maron da fajrujoj en la nokto, restos en ĉies koroj eterne, lumantaj kiel la finaj artefaritaj fajroj, sigele de tri horoj da




aŭtentika ĝojo.

La esplanado de la universitato de Tor Vergata akceptis kun festanta aplaŭdego la Papon, kiu, mano en la mano kun kvin geknaboj, reprezente de la 5 kontinentoj, trapasis la pordon, simbolon de Kristo.



Intertempe la nokto aperis, kaj pli ol du milionoj da kandeletoj ekbrilis. La tre malnova ikono de Maria, savo de la roma popolo estis alportita procesie kaj komenciĝis la memorigo pri la martiroj de ĉiuj jarcentoj. Sekvis la atestoj de tiuj kiuj travivis la kredon: kvar junuloj rakontis la turmentatan situacion de Angolo, de Rumanio; aliaj rakontis pri la malfacilaĵoj kontraŭ la kredo en la nuntempa socio. Sekvis la pinta momento: la legado el la evangelio laŭ Marko. "Kiu diras la homoj ke mi estas?", demandas Jesuo; Petro respondas: "Vi estas la Kristo". «Kial ĉi tiu dialogo?» demandas la Papo. Dum ĉi tiu dialogo kaj des pli en la renkonto kun Tomaso post la Resurekto, ekstaras grava temo. «Ĉu estas vere ke la Filo de Dio mortis kaj resurektis?». Por respondi, necesas persona renkonto kun Kristo. La Papo, samkiel li faris per sia mesaĝo por la JMT, invitis la geknabojn al tiu starpunkto, kiu estas preskaŭ nova martiriĝo: «Eble al vi oni ne petos la sangon, sed tutcerte la fidelecon al Kristo. Fideleco travivenda ĉiutage dum ĉiuj situacioj. Mi pensas, ekzemple, al la gefianĉoj, al iliaj malfacilaĵoj vivi en



***Knabo sukcesis trapasi la "muregon" de la sekurecservoj, kaj alparoli la Papon. Post li, ankaŭ knabino sukcesis, kiel montris la televida rekta elsendo.***



la hodiaŭa mondo kaj vivi la purecon, atende de geedziĝo; mi pensas al la junaj paroj kaj al la elprovoj je kiuj estas elmetata ilia sindevigo por reciproka fideleco; mi pensas al la rilatoj inter geamikoj kaj al la tento esti mallojalaj kiu povas entrudiĝi meze de ili».

Tiu starpunkto, al kiu invitas la Papo, estas ankaŭ vivi en la mondo - kie ŝajne unuarangas nur la logiko de profito kaj persona intereso - por ami kaj respekti la homan vivon kaj por aktivi favore al paco: «Jen, karaj gejunuloj, ĉu estas malfacile kredi en tia mondo? En la jaro 2000, ĉu estas malfacile kredi? *Jes, ĝi estas malfacile.* Oni ne devas kaŝi tion. Estas malfacile, *sed per la helpo de la graco, tio eblas*».

La Papo instigis la gejunulojn rigardi al Kristo: «En la realo, **estas Jesuo, kiuj vi serĉas, kiam vi sopiras al feliĉo**. Estas Li, kiu atendas vin kiam nenio, el tio kion vi trovas, kontentigas vin; estas Li la beleco kiu multe allogas vin; estas Li kiu provokas vin per tiu soifo je tuteco kiu ne permesas al vi adaptiĝi je kompromisoj; Li instigas vin forpreni la maskojn kiuj igas falsa la vivon. Li estigas en vi igi vian vivon io granda, la volon sekvi idealon, la rifuzon esti englutitaj de mediokreco, la kuraĝon aktivi kun humileco kaj konstanteco, por plibonigi vin mem kaj la socion, igante ĉi-lastan pli humana kaj frata».

Fine, la invito diri jes al Kristo, kiel faris la Virgulino Maria antaŭ dumil jaroj: «Karaj geamikoj, mi vidas en vi la ''gardostarantojn de la mateno'' en ĉi tiu tagiĝo de la tria jarmilo. Dum la mortanta jarcento, junuloj kiel vi estis arigitaj por amasaj kunvenoj, por lerni malami, kaj oni sendis ilin al batalo unuj kontraŭ la aliaj. La diversaj sekularizitaj mesianismoj, kiuj klopodis antataŭigi la kristanan esperon, aperis poste kiel veraj inferoj.

Hodiaŭ vi venis ĉi tien por deklari,



diris kelkajn vortojn al la gejunuloj, speciale al tiuj plej malproksimaj el la podio: «Mi salutas ankoraŭfoje vin ĉiujn, speciale tiujn, kiuj estas tie fone, en ombro, kiuj vidas nenion. Sed kvankam ili ne povis vidi, ili certe aŭdis ĉi tiun bruegon. Ĉi tiun bruegon aŭdis la tuta Romo kaj neniam ĝi forgesos ĝin!».

ke dum la nova jarcento **vi ne konsentos fariĝi rimedoj de perforto kaj de detruado**; vi defendos la pacon, persone pagante se necesos. Vi ne estu rezignaciaj en mondo kie aliaj homaj estuloj mortas pro malsato, restas analfabetaj, ne havas laboron. Vi defendos la vivon ĉiumomente ekde ĝia surtera apero; vi ĉiel klopodos, per ĉiu via energio, igi ĉi tiun teron pli kaj pli loĝebla por ĉiuj».

Kaj post plia aplaŭdo, Johano Paŭlo la 2a denove ŝercas kun la gejunuloj: «Estas pola proverbo: se vi vivas kun la junuloj, vi devos juniĝi. Tial, mi foriras rejunigita!».

Sekvis la livero de la Evangelio de la Papo al la gejunuloj: ĉiu knabo skribis dediĉon en sia kopio kaj poste donis ĝin al sia najbaro.

Ĉio finiĝis per la Kredo-formulo, sed antaŭ la eksplodo de la piroteknikajoj (ĉiukoloraj) la Papo denove




## 20.08.2000

*Ĝi estas la granda tasko, kiun la Papo ĉi-matene donis al la senmezura amaso da junuloj de la JMT: 2 milionoj partoprenis en la ferma ceremonio de ĉi tiu grandioza jubilea rendevuo.*

# «VI ESTAS LA JUNA KORO DE LA EKLEZIO Iru en la tutan mondon kaj alportu la pacon»

Bildo kiu daŭros dum la tempo kaj kiu fekunde influos la estontecon: ĝi estas la bildo de la du milionoj da geknaboj de la JMT kiuj ĉi-matene en Tor Vergata, dum la ferma celebro de ĉi tiuj "oceana" eklezia kunveno, sigelis kun Johano Paŭlo la 2a gravan paĝon en la historio de la nuntempa Eklezio kaj kiuj laŭte ekkriis, per sia neeltenebla entuziasmo, ĥoran "jeson": jes al la vivo, al la espero, al la volo marki per la Evangelio sian horizonton. Tiu kiu instigas ilin estas nelacigebla okdekjara "junulo": la paŝtisto de Eklezio kiu, ankaŭ dank' al tagoj kiel la JMT, konfirmas per faktoj la freŝecon kaj viglecon de sia mesaĝo.

Striktaj sur la tero, striktaj en la kredo ĉirkaŭ la Papo: la pli ol 2 milionoj da "matenaj gardostarantoj" (kiel la Papo difinis ilin hieraŭ vespere) ĉi-matene, post la tranokto subĉiela, unu ĉe la alia, festantaj akceptis la Papon. Komence de la celebro, kelkaj junuloj kun palmobranĉoj suriris la podion, dum aliaj 4 alportis ŝtonon



***Vekiĝo post la subĉiela tranokto***



*La Papo salutas unu el la 4 geknaboj, kiuj alportis ŝtonon de preĝejoj kiuj staras je la 4 punktoj de la mondo.*

kiun oni prenis el 4 preĝejoj je la 4 orientigaj punktoj de la mondo. El la nordo: *Churchill Hudson Bay*; el la Sudo: *Punta Arena*; el Okcidento: *Samoa Appia*; el Oriento: *Taraua*.

Sekvis la liturgio de la Parolo. En la Evangelio oni rakontas kiel la popolamaso skandaliĝis pro la vortoj de Jesuo, kiu difinis sin "pano de vivo". Tio okazis, ĉar ilia perspektivo estas tro materia, klarigis la Papo, kiu memorigis ankaŭ la demandon de Kristo al la disĉiploj: «Ĉu ankaŭ vi volas foriri?».

«''Ĉu ankaŭ vi?'' - la demando de Kristo trasaltas la jarcentojn, atingas nin kaj estas proponita persone al ni. Ĝi urĝe petas de ni respondon. Kiu estas via respondo? Karaj gejunuloj, se ni estas ĉi tie hodiaŭ, tio okazas ĉar ni rekonas nin en la deklaro de apostolo Petro: "Sinjoro, al kiu ni iru? Vi havas vortojn de eterna vivo". La Vorto kiu fariĝis karno ĉeestas en la Eŭkaristio, diris la Papo; kaj pri la decidodonaj elektoj por la gejunuloj, li aldonis: «La fundamenta demando estas **'kiu'**: al 'kiu' iri, 'kiun' sekvi, al 'kiu' konfidi sian vivon... Jes, karaj geamikoj, Kristo amas nin kaj amas nin poreterne! Li amas nin ankaŭ kiam ni ne respondas je tio, kion li atendas de ni. Li neniam fermas la brakojn de sia mizerikordo. Kiel eblas ne esti dankaj al ĉi tiu Dio, kiu nin elaĉetis, atingante eĉ la frenezecon de la Kruco? al tiu ĉi Dio kiu ekstaris ĉe nia flanko kaj restis ĝisfine?»

Sekve la Papo substrekis kiel urĝas ŝanĝi vojon, por direktiĝi al Kristo: «Jesuo ne ŝatas duonajn decidojn, nek Li hezitas konstante pridemandi nin: ''Ĉu vi ankaŭ volas foriri?''. Kun Petro, fronte al Kristo,

ankaŭ ni volas respondi: ''Sinjoro, al kiu ni iru? Nur Vi havas vortojn de eterna vivo!''».

La Papo petdeziris poste la floradon de pastraj vokiĝoj, memorigante ke tiu, kiu ĉion forlasas por Jesuo, ricevas la centoblon tie ĉi, kaj poste la eternan vivon.




*''Ni kredas je tio''*

Fine, Johano Paŭlo la 2a levas sian dankesprimon al la Sinjoro kaj transdonas al la gejunuloj ilian taskon: «Dankon al Dio pro la irado de la mondaj tagoj de la junularo! Dankon al Dio pro la multaj gejunuloj, kiujn ili koncernis dum ĉi tiu 16 jaroj! Ili estas gejunuloj, kiuj, nun, fariĝinte plenkreskuloj, daŭre vivas en la kredo tie, kie ili loĝas kaj laboras. Vi alportos la anoncon de Kristo en la novan jarmilon. Revenante hejmen, ne disiĝu. Konfirmu kaj pli-





profundigu vian aliĝon al la kristana komunumo al kiu vi apartenas.

El Romo, el la urbo de Petro kaj de Paŭlo, la Papo akompanas vin kun amemo kaj, parafrazante eldiron de Sankta Katerina el Sieno, li diras al vi: ''Se vi estos tio, kion vi devas esti, vi metos fajron en la tuta mondo!''».

Inter la lastaj eventoj de la celebro estis la saluto de la prezidanto de la papa Konsilio de la laikoj, kardinalo Stafford, kaj la laŭtlego de la mesaĝo de la Forumo, per kiu la gejunuloj esprimis sian aliĝon al la tasko ricevita de la Papo, esti signo de kontraŭdiro, vivi en Kristo. Je la momento de la Eŭkaristio, por ke ĉiuj povu ricevi ĝin, preskaŭ 4000 eksterordinaraj ministrantoj helpis alporti ĝin, sub la tradiciaj ombreletoj.



La celebron fermis la trapreĝo de la Anĝeluso: la Papo salutis kaj dankis la religiajn kaj civilajn aŭtoritatulojn, kaj fine la gejunulojn, kiujn li difinis: "mia ĝojo kaj krono". «**Vi estas la juna koro de la Eklezio:** iru en la tutan mondon kaj alportu la pacon. La Sinjoro vivas, la Sinjoro resurektis, Li iras kun vi. Estu liaj atestantoj meze de viaj samaĝuloj, je la tagiĝo de la nova jarmilo».

Fine, la anonco pri la venonta JMT, kiu okazos en Toronto, Kanado, en 2002.

## 23.8.2000

# MI NENIAM POVOS FORGESI LA ENTUZIASMON DE TIUJ GEJUNULOJ!

*Dum la hodiaŭa ĝenerala aŭdienco en Placo Sankta Petro, la Papo parolis pri la memorinda evento de la JMT*



**Ili ne maltrafis la okazon**: saluti ankoraŭfoje sian amatan Papon, lasi al li denove mesaĝon de entuziasmo, de amemo, de sindevigo. Tial, 40.000 gejunuloj - eta ĝojoplena frakcio de geknaboj, ankoraŭ en Romo 3 tagojn post la fermo de la JMT - ariĝis ĉimatene en Placo Sankta Petro, sub broganta suno, por partopreni en la ĝenerala aŭdienco. Johano Paŭlo la 2a donis al ili sian preskaŭ tutan atenton: lia parolado estis revuado de la Jubileo de la junularo "neforgesebla evento".

Gravurita en lia memoro restos - kiel li mem malkaŝis - la bildo el la aviadilo per kiu li atingis Tor Vergata'n, vespere de la viglado: «Superflugante tiun areon per helikoptero, li admiris el la supro unikan kaj impresigan spektaklon: senmezura homa tapiŝo de festantaj personoj, feliĉaj resti kune. Mi neniam povos forgesi la entuziasmon de tiuj gejunuloj. Mi deziris ĉirkaŭbraki ilin ĉiujn, kaj esprimi al ĉiu el ili la amemon kiu min ligas al la junularo de ĉi tiu nia epoko, al kiu la Sinjoro konfidas grandan mision por la servo je la civilizacio de Amo».

Oni ne forgesas la ondon da entuziasmo, kiu trairis Romon unue kaj poste Tor Vergata'n. «La gejunuloj venis al Romo - memorigis la Papo - por serĉi Kriston, por renkonti lin. Kaj Jesuo mem - li aldonis - konfidis al la gejunuloj la apartan mision esti liaj atestantoj en ĉiu angulo de la tero». Jes, temas pri malfacila tasko, sed la "spino" de ilia misiista kapablo estas la kredo.

Ne timigas ilin malforteco, ĉar ili kalkulas je la amo kaj je la mizeri-



*"... mi admiris el la supro unikan kaj impresigan spektaklon: senmezura homa tapiŝo de festantaj personoj, feliĉaj resti kune"*

kordo de la ĉiela Patro, kiu subtenas ilin ĉiutage. Trans ĉiu raso kaj kulturo, ili sentas sin gefratoj kunigitaj de unika kredo, de unika espero, de sama misio: fajrigi la mondon per la amo de Dio. La gejunuloj evidentigis, ke en ili estas postulo: ili serĉas motivojn de espero kaj malsatas je aŭtentikaj spiritaj spertoj.



Al ĉiuj gejunuloj mi volas ripeti: estu fieraj pri la misio kiun la Sinjoro konfidis al vi kaj plenumu ĝin per humila kaj senpaga konstanteco. Subtenu vin la patrina helpo de Maria, kiu viglis super vi dum la tagoj de via Jubileo. Kristo kaj lia Eklezio kalkulas je vi!».

*Vojaĝante al Romo, la tutmondaj gejunuloj etapis en diversaj italaj urboj, gastigitaj de lokaj kristanoj. Paola Ambrosetto rakontas sian sperton dum la restado de junaj pilgrimuloj en Venecio.*

# Survoje al Romo

Antaŭ la alveno de la junularo en Romo (15-20 de aŭgusto), familioj de italaj diocezoj gastigis la neitalajn pilgrimulojn. De la 10a ĝis la 14a de aŭgusto la Venecia diocezo gastigis 500 gejunulojn, plejparte polojn. Mi gastigis polajn junulinojn aĝajn inter 16 ĝis 19 jaroj, el diocezo Sandomierz, kaj mi ankaŭ akompanis grupon tra Venecio kun la volontuloj. Jes, ĉar ankaŭ en Venecio, multegaj volontuloj zorgis por ke la gastoj travivu taŭge la Jubileon. La pilgrimantoj pasis malmultan tempon kun la gastigantoj: ili foriris el loĝejoj frumatene, kaj revenis tre malfrue.

Post longa tago dum kiu oni vizitis preĝejojn, muzeojn, vidindaĵojn tra Venecio, kun varmego kaj ŝvito, vespere okazis ĉu folklora internacia prezentado, ĉu preĝo en la Baziliko de Madono de la Resaniĝo, ĉu solena Meso en la Baziliko de Sankta Marko celebrita de la ĉefepiskopo de Venecio.

Mi ĉeestis la internacian vesperon, kie, en grandega preĝejo de mia urbo Mestre, poloj, hungaroj, rumanoj, libananoj, kanadanoj, laŭvice prezentis popolkanton, dancon en folkloraj vestoj, skeĉon pri historio de sia popolo, evangeliajn kantojn kun gestoj.

Ni venecianoj miris ke inter la junularo konfuziĝis junegaj monaĥinoj kaj pastroj kun mallongaj flavaj pantalonoj, bunta trikotaĵo, moderna ĉapelo kun viziero. Ili estis tiel spritaj, babilemaj, ridetemaj, viglaj, ke nia konceptado pri la klerikaro ne rekonis ilin pastroj tiel. Ni kutimas pensi al monaĥinoj aŭ al pastroj kiel al malgajaj vizaĝoj, kvazaŭ ili ne rajtus ŝerci. Sed samtempe tiuj pastroj, kaj la



*La polaj JMT-gastinoj ĉe Paola kaj Giovanna* (plej dekstre en la foto) *Ambrosetto.*

gejunuloj mem, pasante antaŭ la Sakramento, ne alproksimiĝas malatente sed ili ĝenuiĝas tiom bonsintenaj kaj absorbitaj, ke ili ne aspektas tiuj samaj, kiuj antaŭ du minutoj kantis tiom amuze kaj vigle.

Mi havis motivon de admiro ankaŭ pro la veneciaj gejunuloj, kial ne? Kiam mi vidis kiom zorgeme estis pretigita la loko por la vesperoj, la impona scenejo (oni reproduktis la kolonojn de Sankta Marko kaj Sankta Teodoro, en Venecio) ĝis la plej malgrandaj detaloj, mi pensis ke dum multaj monatoj ili cerbumis, konstruis, kaj ĉefe preĝis por ke ĉio realiĝu bone. Kaj kiam la multaj grupoj finis sian prezentadon, el la altega plafono svingis buntaj paperaj papilioj, kaj ĉiuj iris por kolekti almenaŭ unu el ili, kiel memoraĵon. Kiel infano kiu alportas floron al sia patrino, ili iris alporti papilion al pastro aŭ al monaĥino kiu restis sidanta.

La lastan vesperon, la familioj atendis la knabojn en la loko kie haltas ilia aŭtobuso. Atendante, ni rakontis pri nia mallonga sperto. Preskaŭ ĉiuj havis problemojn pro la lingvo, kvankam la volontuloj estis tre precizaj ankaŭ pri tio: kiam mi akceptis gastigi la pilgrimantojn, oni petis al mi kiujn lingvojn mi konas. Kaj, surprizon!, unu el la knabinoj indikitaj al mi parolis ĝuste la francan, kiun mi konas! Sed mia amiko havis problemojn, ĉar unu el la knabinoj ĉe li, post la alveno, fartis malbone, kaj matene ŝi ne povis



*Kun la venecia flago en Romo*

trairi Venecion kun la grupo. Li ne komprenis kion ŝi havis, kaj ne povis helpi. Por kelkaj estis malfacile diri eĉ simplajn aferojn, kiel: duŝo, kion manĝi, ĉu vi ŝatas, ktp. Sed je la fino ĉiuj estis kontentaj.

Dum mi atendis la aŭtobuson de niaj gastoj, ŝajnis al mi esti kiel la gepatroj atendantaj la infanojn ekster la lernejo. La tagon de la foriro al Romo, ĉiu familio havis fotilon, por memorigi ĉi tiun sperton kun la junularo.

Por kelkaj venecianoj temis pri la plej grava sperto dum la Jubileo.

**Paola Ambrosetto**

IKUE 90-JARA

# AUSTIN RICHARDSON (1843-1913) LA UNUA IKUE-PREZIDANTO

### *Dua parto*

*Ni daŭrigas la publikigon de la prediko, kiun la unua Prezidanto de IKUE faris en 1910, memorigante la fondinton de ĉi tiu revuo, Pastro Emile Peltier.*

[Pastro Peltier] bone komprenis, ke, se la lingva diverseco estas barilo kontraŭ la paco kaj la amo inter la nacioj, ĝi estas certe la plej granda barilo kontraŭ la disvastigado de la vera religio. Kiom da antaŭjuĝoj, kiom da eraroj oni povus venki, se ekzistus lingvo, de ĉiu sciata, per kiu la katolikoj povus interrilati kun siaj karaj gefratoj disigitaj.

Do, Abato Peltier ekzamenis, senpartie, Esperanton kaj tuj rekonis ĝiajn mirindajn ecojn. Li ankaŭ tuj antaŭvidis, ke la malamikoj de nia sankta religio certe ne malatentus pri tia propagandilo, ke, male, ili certe estis uzontaj ĝin same, kiel ili uzadas la presadon aŭ la artojn, por ataki la Kristan religion. Do, tiu kuraĝa pastro timis nek la kontraŭstaron de la malamikoj, nek la mokojn de siaj samreligianoj. Kiel la profeto li ekkriis: "Pro Sion mi ne volas silenti, pro Jerusalemo, pro la eklezio de Dio mi ne volas trankviliĝi", ĝis kiam la katolikoj fine estos konvinkitaj, pri la neceso uzadi tiun novan armilon por la servo de nia sankta religio.

Ne estas facile nun komprenigi al katolikoj la neceson esti ĉiam ĉe la unua rango de la progreso, ĉiam uzadi ĉiun novan elpenson de la homa intelekto por la plej granda gloro de Dio. Multaj katolikoj estas piaj, malmultaj estas praktikaj progresemuloj. Nun tamen Esperanto estas pli bone konata, niaj estroj, niaj pastroj komencas rekoni la forton de la esperantista movado, sed je la komenco de tiu-ĉi jarcento estis milfoje pli malfacile. Pastro, kiu sincere konfesis ke ne la latina lingvo, sed nova artefarita lingvo pli taŭgus por ludi la rolon de lingvo internacia, bezonis kuraĝon. Emilio Peltier havis tiun kuraĝon "pro Sion li ne volis silenti, pro


4a Jaro 1906-07 Oktobro Nº 21

BENO DE PIO X-a

Al Espero Katolika kaj al ĝiaj redaktoroj.

*Espero Katolika anoncas la unuan benon ricevitan de Papo (Pio la 10a, 1906).*

Jerusalemo li ne volis trankviliĝi". Li neniam havigis honoron, titolon, altan situacion, sed li laboris, penadis, li ruinigis sian sanon, ĝis la morto, sen iu ajn espero de rekompenco homa, por ke, almenaŭ unufoje en la historio de la mondo, la katolikoj estu kaj restu ĉe la unua rango, ĉe la unua posteno de nova neŭtra movado. Kaj dank' al lia sindonemo, li sukcesis, kvankam la prezo de l' venko estis lia nematura morto. Jes, li sukcesis. Malgraŭ sia malriĉeco, li fondis revuon, nian karan *Esperon Katolikan*. Je la jaro 1906 li havigis la specialan benon de nia Sankta Patro, la Papa Moŝto Pio X[a]. Tiu vera ĉefpastro de la Krista ŝafaro depost tiu momento patre favoras nian movadon. Li sendis sian apostolan benon al la katolikoj ĉeestantaj la trian kongreson en Cambridge kaj la lastan jaron li, plue, donacas plenarian indulgencon al la kongresantoj en Barcelono, laŭ la ordinaraj kondiĉoj.


*Pastro Emile Peltier*

Dank' al la laboro, dank' al la penado de Abato Peltier ni povas nun diri, ke ĉe tiu granda paca armeo el kiu konsistas la Esperanta movado, ni katolikoj staras inter la unuaj rangoj. Vidu ni, tiun belan, grandan armeon, konstatu ni ĝian ĉiujaran progreson.

Kiam Abato Peltier komencis labori por Esperanto, ekzistis en la mondo dek esperantistaj ĵurnaloj, nun ekzistas pli ol naŭdek. Ekzistis eble cent grupoj, nun ekzistas pli ol mil-okcent. Ekzistis esperantistoj en naŭ diversaj landoj, nun ni havas samideanojn kaj grupojn en pli ol 40 landoj en la kvin partoj de la mondo. La movado estas tutmonda, kaj ĝia nuna stato estas nur ombro de tio, kion promesas la estonto. Ne estas dube, ke la Esperanta movado iĝos unu el la plej gravaj faktoj de tiu-ĉi jarcento. Tiu movado ne estas rekte religia, ĝi estas homa, kaj en tiu homa movado neniu eĉ sonĝas rifuzi al ni katolikoj la gravan kampon, kiun Abato Peltier havigis por ni. Multaj el niaj samideanoj ne estas katolikoj. Multaj tute ne akceptas nian kredon, sed mi kuraĝas diri, ke la esperantistaj katolikoj estas respektataj, estimataj ĉie en la tuta esperantistaro. Mi ĝoje, dankeme, konfesas, ke ĉie en la mondo, precipe en tiu-ĉi nobla ĉefurbo, kie ĉiuj

> "... de du jaroj Abato Peltier suferis pro stomaka malsano kaj pro tio li devis forlasi sian karan laboron. Timante la malvarmecon, li foriris al Pau, kaj post tri monatoj li petis ke oni alkonduku lin ĝis Lourdes, kie li deziris ricevi resaniĝon de la Sankta Virgulino aŭ morti apud tiu Sanktega Patrino. Tiu lasta religia deziro estis nur efektivigita laŭ la Dia Volo. Ĝis la lasta horo li konservis sian konscion, sian tutan submetiĝon al la volo de Dio, kaj ripetis: «Mia Dio, mi prezentas al vi mian vivon por Franclando, por mia revuo Espero Katolika, por tiuj, kiuj preĝis aŭ preĝos por mia animo»"
>
> *(el nekrologo redaktita de Josée Guivy, EK marto 1909)*

esperantistoj estis, estas, kaj mi ne dubas, estos, ĉiam pretaj helpi nin, tial ke ili konstatas ke ni laboras, tiel fervore kiel ili, por la triumfo de Esperanto. Kaj se ni ne povas konsenti kun ili pri ĉio, almenaŭ, kiel esperantistoj, ni havas unu komunan celon: la fratan amon de la tuta homaro, laŭ la fundamenta leĝo de nia dia Majstro: "Amu vi unu la alian".

Kaj nun, karaj gefratoj, kiel ni povus elmontri nian dankemecon al nia kara Majstro Abato Peltier. Ne laŭdante lin, sed sekvante lin, helpante liajn posteulojn daŭrigi lian laboron. Laŭ lia opinio, la plej grava fako de sia propagando estis lia ĵurnalo, la revuo *Espero Katolika*. Por konservi tiun ĵurnalon, li batalis ĝis la fino de sia vivo, kaj kiam lia malsano, lia malforteco, devigis lin transdoni la redakton kaj la direkton al aliaj manoj, li petegas nin daŭrigi lian laboron kaj precipe disvastigi la revuon pli kaj pli.


Tiu kongreso elmontras la pravecon de tiu opinio. Efektive, estas per nia revuo, legata en 43 landoj, ke ni sciiĝis pri la granda movado, al la reunuiĝo de la kristanaro. Sen *Espero Katolika*, tiu kongreso ne estus ebla. Ni do kuragas petegi vin, karaj gefratoj, helpi nin. Ni ne petas monhelpon, sed nur, ke ĉiu katoliko abonu nian revuon, por starigi la laboron de nia kara fondinto sur firma fundamento.

Nia kara majstro D-ro Zamenhof nomas nin la Esperantistojn: pacaj batalantoj. Jes, ni devas batali ne kontraŭ la homoj sed kontraŭ la malvirtoj, kontraŭ kelkaj malbonaj instiktoj, kiuj estas bariloj al la progresado de Esperanto. Unue ni devas batali kontraŭ la mallaboreco homa. La plimulto ne volas kredi ke nia lingvo estas tiel

**(daŭras je paĝo 148)**




*La devenregiono de p. Peltier: Villandry (kie li naskiĝis), Sainte-Radegonde (en kies seminario li studis), Tours (kie li eldonis EK).*


N° 13. Acte de Naissance de Peltier Emile Claude, enfant légitime du sexe masculin, né le 20 7bre et enregistré le 21. Garçon.

L'an mil huit cent soixante dix, le vingt un septembre à neuf heures du matin. Devant nous, Edouard Hainguerlos Maire et Officier de l'état civil de la Commune de Villandry, Canton de Tours, département d'Indre-et-Loire, est comparu: le sieur Auguste Peltier, charron forgeron, âgé de trente un ans, domicilié au bourg de Villandry, lequel nous a présenté un enfant du sexe masculin né le vingt de ce mois, à onze heures du soir dans sa maison, de lui déclarant et de son épouse Ernestine Anne Gachereau, mercière, âgée de vingt six ans; auquel enfant que nous avons reconnu vivant, il a donné les prénoms de Emile Claude.

Les présentation et déclaration ci-dessus ont été faites en présence de Alphonse Théophile Tabary, instituteur public âgé de cinquante ans, et de Pierre Gascon tailleur d'habits âgé de quarante huit ans, tous deux domiciliés au bourg de Villandry; lesquels témoins ainsi que le père de l'enfant ont signé avec nous le présent acte après lecture faite.

## LA ORIGINALA DOKUMENTO PRI LA NASKIĜO DE EMILE PELTIER

N-ro 13
Naskiĝo-akto de Peltier Emile Claude, justa infano virseksa naskita la 20an de septembro kaj registrita la 21an.
Masklo.

Jaron 1870, la 21an de septembro je la 9a matene.
Antaŭ ni, Edouard Hainguerlos, Urbestro kaj Oficisto de la civila etato de la Komunumo de Villandry, kantono de Tours, suda departemento de Indre kaj Lojro, aperis: sinjoro Auguste Peltier, forĝisto de ĉaroj, 31-jaraĝa, loĝanta en Bourg de Villandry, kiu montris al ni infanon virseksan, naskitan la 20an de la nuna monato, je la horo 23a, en lia hejmo, el lia justa edziĝo kun Ernestine Anne Gachereau, merceristino, 26-jaraĝa; al ĉi tiu infano, kiun ni konstatis vivanta, oni donis la nomojn Emile Claude.
Ĉi-supraj prezento kaj deklaro estis faritaj je la ĉeesto de: Alphonse Chéophile Tabary, publika instruistino, 50-jaraĝa, kaj de Pierre Gascon, tajloro de vestaĵoj, 48-jaraĝa, ambaŭ loĝantaj en bourg de Villandry; la atestantoj kiel ankaŭ la patro de la infano subskribis kun ni ĉi tiun akton post farita legado.

*La IKUE-arkivo posedas kserografion de ĉi tiu dokumento dank' al Raymond Boré.*

**HEROLDO DE ESPERANTO**
*la plej ofta kaj populara internacia gazeto en Esperanto, estas de 79 jaroj je la servo de la Internacia Lingvo. 16 numeroj jare, ilustritaj raportoj el la tuta mondo, diversaj rubrikoj, kalendaro, duobla Kongresa numero ktp. Baza jarabono 55 ned. guld. Mendu provekzempleron ĉe:* Heroldo de Esperanto, CP 237, CH-6830 Chiasso 1, Svislando

*La Itala Radio elsendas en esperanto ĉiun sabaton je horo 22a laŭ la mezeŭropa tempo, laŭ jenaj frekvencoj:*
***9585 kaj 11740 KHz** (31.29 kaj 25.55 m)*
***satelito: Eutelsat Hot Bird 1***
***(13° E subp. 7.56 de RAI2, 11.446 MHz)***
*Vi povas ricevi senpage bultenon. Skribu al:*
**RAI INTERNATIONAL, Esperanto**
**C.P. 320, I-00187 ROMA, Italio**

mirinde facila, ili ne volas fari la malgrandan penon necesan por lerni ĝin. Klopodu ni pacience, bonhumore por venki tiun mallaboremecon, precipe ĉe niaj geamikoj kaj kunuloj. Due, ni devas venki la malfeliĉan pesimismon, tiel komunan hodiaŭ. Multaj diras, ke la lingvo internacia ne estas ebla tial, ke ĝis nun neniu projekto sukcesis. Venku ni tiun pesimismon per la videbla pruvo, ke la internacia lingvo ne nur estas ebla, sed efektive ekzistas, kaj nur bezonas la konsenton de ĉiuj por plene efektivigi sian celon.

Nun karaj gefratoj, *sursum corda*: supren la koroj, aŭdu la vortojn de la profeto. Kun li ĉiu el ni ekkriu: Mi ne volas silenti pro Sion, kaj pro Jerusalem mi ne volas trankviliĝi, ĝis kiam la Sankta Eklezio Katolika uzados tiun potencan armilon, la lingvon internacian. Kaj por kiu celo? Por alvoki ĉiujn homojn, ĉiujn gentojn, ĉiujn popolojn por ke ili eniru la sanktan urbon Jerusalem, la unu veran Eklezion, la unikan ŝafaron de la bona paŝtisto Jesuo. Ni volas per Esperanto igi la vojon facila por la popolo, por la simplaj, la nekleraj, por ke ĉiu povu, per nia simpla lingvo, lerni la veran religion, por ke estu fine nur unu ŝafaro kaj unu paŝtisto. Nun, karaj gefratoj, aŭskultu la vortojn de la profeto Isaio: en tiu-ĉi sama ĉapitro, li ekkrias: "Eniru, eniru tra la pordoj, preparu la vojon, faciligu la piediron, forprenu el ĝi la ŝtonojn, altigu la standardon antaŭ la vido de la gentoj. Ili, kiuj venos estos nomataj la popolo sankta, la gento savita de la Sinjoro".



Turnu ni al Jesuo, ĵuru ni hodiaŭ esti ĉiam fidelaj soldatoj, dediĉu al lia servo nian verdan standardon, nian homan movadon, ke ĉio sur la tero servu al lia gloro kaj al la savo de la animoj, kiujn li reaĉetis per sia multkosta sango. Kaj vi, ho Maria! Vi la Dipatrino, kaj samtempe nia Patrino, vi kies brakoj ricevis nian karan Majstron, Emilio Peltier, kiu volis morti nur en Lourdes apud la sankta groto, kie vi iam aperis, preĝu por ni, preĝu por la sukcesu de nia movado, ĉar ĝi nur celas vian gloron kaj la gloron de via filo. Pro Jesuo, pro Maria ni ĉiam laboros, ni neniam laciĝos; helpitaj de vi, ni kuraĝiĝos; malgraŭ ĉiu malfacilaĵo, malgraŭ ĉiu penado, ni ĉiam ekkrios: "Pro Sion mi ne volas silenti, kaj pro Jerusalemo mi ne volas trankviliĝi". Ĝis kiam la lasta ŝafo estos enirinta la ŝafaron de la Unika Paŝtisto. Amen.

**P-ro Austin Richardson**

*prediko en Parizo, Kapelo de la Karmelanoj, okaze de la unua IKUE-kongreso, 31.3.1910*

P. Manuel Casanoves havigis al IKUE plian materialon pri p. Richardson. Koran dankon! Ni publikigos parton el ĝi en unu el la venontaj numeroj.

★**IKUE 90-JARA**★ En la venonta numero: Biografio de Claudius Colas

# Dulanda IKUE-renkontiĝo en Žilina



Oni povas paroli jam pri "tradicio, ĉar dum la lastaj jaroj, kunvenis regule ĉeĥaj kaj slovakaj katolikaj esperantistoj, alterne en ambaŭ landoj: ili ja ĝis 1992 vivis en komuna lando. Ĉi-jare oni kunvenis jam por la tria fojo, en la nordslovakia urbo Žilina. La loka salesana domo donas tre favorajn kondiĉojn por similaj okazaĵoj, ĉar ĉio povas tie okazi "sub unu tegmento". La renkontiĝo okazis en la tagoj 18a, 19a kaj 20a de aŭgusto.

Bunta programo, pretigita de la lokaj gesamideanoj, denove riĉigis ĉiujn partoprenantojn, venintajn el diversaj regionoj ne nur de Slovakio kaj Ĉeĥio, sed ankaŭ el plej fora okcidenta Germanio. Krom komuna kunveno de ambaŭlandaj IKUE-sekcioj kaj de interesaj prelegoj, oni abundigisa tiun riĉan tritagon per kantado prezentita precipe fare de frato Miroslav Smyčka, profesia operkantisto, per busa ekskurso al interesaj vidindaĵoj de la urbo kaj ĝiaj ĉirkaŭaĵoj. Ni vizitis la regionan Muzeon en Kastelo Budatíu, la pilgriman lokon Teplička n.Váhom kie staras la tombo de Sofia Bosniaková (okazas proceso por ŝia beatproklamo), kaj poste la novkonstruitan preĝejon de la bona Paŝtisto en moderna urba loĝkvartalo. Ni nur bedaŭris, ke nian renkontiĝon ne povis partopreni sacerdoto Roberto Horváth, kiu abrupte malsaniĝis. Pro tio, ni partoprenis slovaklingvajn sanktajn mesojn celebratajn en salesana preĝejo. Menciindas krome la temoj de la prelegoj. Ĉefe oni turnis la atenton al la ĉefa slogano de la kunveno: la Eklezio en la tria jarmilo.

Miroslav Smyčka parolis pri la karitataj agadoj de la katolikoj rilate al la proksimuloj; Miloslav Šváček, pri la taskoj de ni kristanoj sojle de la tria jarmilo; inĝ. Jan Kalný pri la pretigo de la plena parlamento (Koncilio) de la ĉeĥa Eklezio *(artikolo en unu el la venontaj numeroj de EK, ndlr)* kaj inĝ. Vladimír Němec pri problemo-havaj periodoj de la historio de nia Eklezio.

Kiam dimanĉe la 20an de julio, post la tagmanĝo, ĉiuj gefratoj adiaŭis unu la alian, oni alte taksis la nivelon de ĉi tiu bela aranĝo. Meriton pri ĝi havas frato precipe frato Vladimír Němec el Žilina kaj liaj, same oferemaj, kunlaborantoj.

Pst unu jaro oni denove renkontiĝos, ĉi-foje en la ĉeĥa Respubliko. Ĉiuj estos bonvenaj!

**Inĝ. Jan Kalný**




*En la fotoj de V. Němec videblas: (en la apuda paĝo) la partoprenantoj fronte al la Salesana Domo kaj (ĉi-alte) kelkaj el la prelegantoj: Miloslav Šváček, Jan Kalný kaj Miroslav Smyčka.*

Tre sukcesa estis ankaŭ ĉi-jare la Katolika E-Tendaro en Sebranice
Raporto en la venonta numero!

## 15a EKUMENA KONGRESO 2001

54a de IKUE, 51a de KELI

ZAGREBO (KROATIO) 14-21 Julio 2001

Ĝis nun aliĝis 34 personoj.

*Se Vi ne trovis la aliĝilon en ĉi tiu numero de EK, petu ĝin al:*

Centra oficejo de IKUE - Via di Porta Fabbrica 15, I-00165 ROMA RM, Italio

**Rapidu! La 31an de decembro finiĝos la unua aliĝperiodo!**

**RADIO VATIKANA - Elsendoj en Esperanto**

*La elsendoj okazas en tri tagoj de la semajno, en la sama* **horo 21.20 MET (19.20 UTC)**
**DIMANĈE - daŭro 9'20"** - frekvencoj: *mezonde 527 kaj 1530 kHz - kurtonde 4.005* (74.90 m.), 5.880 (51.00 m.) kHz. Por Romo, ankaŭ: *frekvencmodulado: 93,3 kaj 105* MHz. *La dimanĉa elsendo estas ripetata je la mezeŭropa horloĝa horo 23.50, per frekvencoj 527 kaj 1530 kHz mezonde kaj pere de la romaj FM-frekvencoj.*

**MERKREDE KAJ ĴAŬDE - daŭro 9'** - frekvencoj: *mezonde 1.611 kHz - kurtonde 7.250* (41.37 m.) kaj 9.645 (31.10 m.) kHz.

Ĉiujn ĉi elsendojn, je la indikitaj tagoj kaj horoj, oni povas aŭskulti per la Interreto:
**http://www.vatican.va/news_services/radio/multimedia**
aŭ: **http://www.vaticanradio.org**

La elsendoj estas aŭskulteblaj ekster Eŭropo ankaŭ per jenaj satelitaj kanaloj. Dimanĉe: AOR 1 (UTC) INTELSAT 325,5° East (Atlantic) 4097.75 Mhz Polarization LHCP. Merkrede kaj ĵaŭde: IOR 1 (suna horo) INTELSAT 602,62° East (Indian) 4097.100 Mhz Polarization LHCP

*Petu la senpagan sesmonatan program-bultenon. Skribu al:*
**RADIO VATIKANA - ESPERANTO-REDAKCIO**
**SCV-00120 CITTÀ DEL VATICANO (E-poŝto: <esperanto@vatiradio.va>)**

*Valora kunlaboro*

## LA SINJORINOJ, KIUJ HELPADIS LIN (Luk 8, 1-3)

*Jesuo iradis tra urboj kaj vilaĝoj, proklamante la bonsciigon pri la Regno de Dio. Iris kun li la dekduopo, kaj kelkaj virinoj de li sanigitaj el malbonaj spiritoj kaj malsanoj. Temis pri Maria nomata la Magdalana, el kiu estis elpelitaj sep demonoj, Johana, edzino de Ĥuzo, administranto de Herodo, Suzana, kaj pluraj aliaj. Ili helpadis Jesuon kaj liajn disĉiplojn per siaj havaĵoj.*

Se konsideri, kia estis la virina viv-kondiĉo en la tiama socia kaj religia vivo, oni konkludas ke Jesuo enkondukis, rilate la virinojn, ĝermojn de revolucio, kiu ankoraŭ ne tute plenumiĝis. Liberigite el malbono kaj malfortikeco fare de Jesuo, ili fariĝas valoraj kunlaborantoj en la vivo de la kristana komunumo.

* * *

Ni ĉiuj konas aŭ aŭdis pri ''feminismaj bataloj''. Verŝajne la aŭtentika kristana solvo kuŝas ne en senkompata batalado, sed en pli profunda kono kaj travivo de la krista amo. P. Battista Cadei — 36 - *(daŭrigota)*



*Maria Magdalena lavas la piedojn de Kristo, pentraĵo de Pieter Paul Rubens (Getty Museum)*

# *Landaj reprezentantoj de IKUE*

*Oni pagu la abonkotizon al la landaj reprezentantoj, samtempe informante pri tio la Centran Oficejon (por ke tuj estu en ordo la ekspedo de la revuo). La baza jara kotizo de membroabonanto estas 25 €, sed ĝi varias laŭ la lando: petu informojn rekte de la landaj reprezentantoj.*

| | |
|---|---|
| **Argentino** | Daniel A. Cotarelo García, Rivera Indarte 232 P.1 A, RA-1406 Buenos Aires |
| **Aŭstrio** | Hans M. Maitzen, Endemanngasse 6-18/1/24, A-1238 Wien<br>*EK-peranto:* Leopold Patek, Martinstr. 104/38, A-3400 Klosterneuburg |
| **Belgio** | Roger De Schepper, Doornstr. 22, B-2610 Wilrijk/Antwerpen |
| **Britio** | P. Charles C.Dornan, Sacred Heart Church 106 Crossgates Bellshill, Lanarkshire, ML4 2LB, Scotland |
| **Ĉeĥa Resp.** | Miloslav Šváček, Tršická 6, CZ-751 27 Penčice |
| **Ebura Bordo** | Justin Doumegnon, 12 B.P. 560, Abidjan 12 |
| **Estonio** | Vjatšeslav Hromov, p.k. 94, EE-76601 Keila |
| **Francio** | Marcel Colleu, 95 rue Victor Hugo, F-80440 Boves - pĉk Lille 10621 81 P. |
| **Germanio** | Hans Moser, Gasteiner Str. 31, D-10717 Berlin |
| **Hispanio** | P. Manuel Casanoves, Str. A.M. Claret 8, E-08500 Vic |
| **Hungario** | P. Lajos Kóbor, H-9484 Pereszteg |
| **Italio** | UECI, viale C. Zavagli 73, I-47900 Rimini RN - c/cp 11129475 |
| **Japanio** | Hatiroo Matubara, Namimatu-tyo 4/5, 596 Kisiwada-si, Oosaka-hu |
| **Kanado** | Janusz Sulżycki, 17-100 Ventura Dr., Stoney Creek, Ont., L8J 2C5 |
| **Kroatio** | Marija Belošević, Sveti duh 130, HR-10000 Zagreb |
| **Kubo** | J.L.Montes de Oca,C./Independencia 186-B, Santo Domingo Villa Clara 53000 |
| **Litovio** | Vladislav Viršila, P.O. Box 30, LIT-5700 Kretinga |
| **Madagaskaro** | Roger Randrianekena, B.P. 14, Ambatondrazaka |
| **Meksikio** | P. José M. Claramunt, apartado 318, MEX-68000 Oaxaca, Oax |
| **Nederlando** | S.P.Smits, Dunantstraat 164, NL-2713 VC Zoetermeer |
| **Niĝerio** | Francis Mary Onyeneke, P.O.Box 1269, Owerri, Imo State |
| **Nov-Zelando** | Mike Leon, 171 Oxford Terrace, Lower Hutt |
| **Pollando** | Pola IKUE-sekcio, ĉe K.I.K., ul. Kopernika 34, PL-00-336 Warszawa |
| **Portugalio** | Portugala E-Asocio, rua Dr J.Couto 6 r/c A, P-1500 Lisboa |
| **Rumanio** | Ignatiu Orha, str. Odobescu Nr. 2, Ap. 34, R-4800 Baia Mare |
| **Ruslando** | Galina Novikova, Zelenograd 327/1 - RUS-103482 Moskva |
| **Slovakio** | Magda Šaturová, Javorinská 33, SK-811 03 Bratislava |
| **Svislando** | P. Francisko Bommer, Communauté Chaminade, ch. de Pellier 10, CH-1950 Sion |
| **Tajlando** | P. Marcel Perray, G.P.O. Box 1846, Bangkok 10501 |
| **Ukrajnio** | P. Serhij Prudko, a.k. 250, 07300 Vyšhorod |
| **Usono** | P. Mubarak Anwar Amar, St.Mary's Roman Cath.Church 312 Park Street, Box 19, Depue IL 61322 |